# EKO 2023

Pensu globe, Agu loke! Por la Landa kaj Faka Laboro

ILEI — Nia aganto pri instruado kaj progreso

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj

**EKO 2023 / 66. Novembro 20 2023**

**Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK**

**Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Elda Doerfler. Tria kontrolanto dezirata.**

**Pezo: Word teksto: 40 KB; Ĝia sveltigita PDF: 390 KB. Alkroĉaĵoj: 155 KB. Sume: KB 585.**

## Juna amiko – unika kaj valora




Se estas unu revuo, kiu meritas pli grandan legantaron, tiu estas la revuo por junuloj kaj lernantoj eldonata de ILEI. Jam nun ekas la reabona momento por 2024. Kiu jam legas la revuon, nepre reabonu ĝin. Kiu ne estas nun leganto, ni instigas vin, mendi la revuon por 2024 kaj post tio decidu ĉu daŭre aboni ĝin.

Ene de 40 paĝoj vi trovos mallongajn riĉe ilustritajn artikolojn, kun aŭtoroj el la tuta Eo-mondo. La lingvaĵo estas pretigita el listo de 1500 radikoj, kaj estas zorge kontrolita. Nia bildo montras la plej lastan numeron, kiu nun estas kontrolata kaj kiu tre baldaŭ aperos.Ni alkroĉas afiŝon, kiun pretigis la nuna kaj multjara redaktoro, Stano Marĉek en Slovakio. Bv. uzi ĝin por kuraĝigi abonadon!

Jarabono por fizike presita revuo kostas € 18 por A-landanoj kaj € 13 por B-landanoj. Reta aliro al la revuo mendeblas por respektive €11 kaj € 7. Pli da informoj kaj mendilo troveblas ĉe: https://www.ilei.info/revuoj/index.php?lingvo=eo

## ILEI aktiva: la kvarmonata raporto

ILEI raportas regule siajn admirindajn laborojn. Ĉi-foje, aperas seplinia resumo komence de la raporto. Nome de EKO, mi kore dankas pro tio, kaj pledas, ke ĉiam aperu tia resumo, kiun mi povas aperigi, alkroĉante la detalan raporton. La raporto aperas aŭtore de prezidanto Ahmad Mamduhi kaj sekretario Elena Nadikova. Jen la resumo: 'Ŝlosilpunktoj: resumoj de la 56-a ILEI-kongreso; novaĵoj pri la kongreso-2024; ILEI-forumoj kaj kunvenoj de la nove fondita retgrupo pri lerneja agado; plua renovigo de la retejo; novaĵoj pri la Komitato kaj Estraro; evoluo de la ekzistantaj kaj novaj projektoj; trejnseminario en Madagaskaro; proponoj de ILEI por la Internacia Tago de la Esperanta Libro; iniciatoj por la celebrado de la 75-jariĝo de ILEI, inkluzive de eldonaj agadoj kaj Premio La Torre; vasta kunlaboro kun enmovadaj kaj ekstermovadaj institucioj.'

## Rekomenditaj libroj por la Zamenhofa Tago

La 15-an de decembro ni festas ne nur la ZAMENHOFAN TAGON, sed ankaŭ tradicie La Tagon de Esperanta Libro. Kiel pasintjare, ILEI proponas du verkojn por la internacia komuna legado. La unua estas klera kaj bone verkita eseo por progresintoj kaj la dua estas fame interesa kaj utila legaĵo por komencantoj.

AM

Nun el la retejo de ILEI (www.ilei.info) elŝuteblas la teksto de Julius Glueck kaj la tri unuaj ĉapitroj de 'La Teorio Nakamura' de Anna Löwenstein, la du proponoj de ILEI por la komuna Internacia legado dum la Tago de la Esperanta Libro.

La Teorio Nakamura (Anna Löwenstein) - tutmonda legado por celebri la Tagon de la Esperanta libro (por komencantoj)

La grandaj filozofoj kaj la universala lingvo (Julius Glück) - tutmonda legado por celebri la Tagon de la Esperanta libro. Vidu ankaŭ sube.

Jozefo Nemeth

## Brazila Kolekto ĉiam bunta



La Muzika Kolekto el Brazilo daŭre proponas al ni kantojn kaj komponaĵojn.

Nova tradukaĵo estas *Pavo misterplena*, el la originalo *Pavão mysteriozo*, verkita de **Ednardo** kaj esperantigita de **Flávio Fonseca**.

**BrazilMuzika Klubo**

brazilakolekto.com/brazilmuzikaklubo

**Brazila Kolekto**

brazilakolekto.com; brazilakolekto@gmail.com

## Penseo daŭre portas al ni poemojn

Ni ne plu alkroĉas la bultenojn pro la pezo, eĉ sveltigitajn. Sed ni povos foje aperigi elektitan poemeton. La retejo de Penseo estas: http://www.elerno.cn/penseo/penlisto.htm

=============================================================

## SCIURO!

**Pufa vostego**
**tremas,**
**per buŝo**
**je manetoj fosantaj—**
**bankumas**
**brunan nukson**
**sekreteme,**
**ago aŭtuna**

**Ardea Restoracio**
**longkrura**
**ardeo bluas statue**
**staras**
**en travidebla**
**restaŭracio estuara**
**atendante alvenon**
**de menua deziro.**



==================================================================

## François La Jacomo en la Konferenco de Unesko

Mesaĝo de s-ino Azulay al la 96a UK/Lisbono, 2018: multlingva prezento:
http://www.linguistic-rights.org/unesco/unesko.html#UNESCO_96aUK

La video en Facebook pri la alparolo de d-ro François Lo Jacomo (11.11.2023):
Alparolo de D-ro François Lo Jacomo, estrarano de Universala Esperanto-Asocio (UEA), okaze de la 42a sesio de la Ĝenerala Konferenco de Unesko (video)

François estas la unua parolanto; li parolas france. Kutime, mi en EKO ne plusendas nacilingvajn erojn; ni faras escepton pro la elstara kvalito de la alparolo; ni vokas al traduko al Esperanto kaj eble pliaj lingvoj. La bendo pluiras longe kun eroj en la angla, franca kaj araba. Pluaŭskultu laŭ viaj emoj kaj lingvaj kapabloj. Ni alkroĉas la tekston en Esperanto. Jam ekzistas traduko al la hispana, pliaj lingvoj estas prilaborataj.

## Voĉdonu pri la ekzamenperiodoj de 2024

En la novaĵo vi trovas informojn pri la ekzamenoj en 2023, kaj peton voĉdoni por la ekzamenperiodoj por 2024 kaj informojn kaj specimenon pri la novaj interagaj ekzercoj kaj testoj de edukado.net. Legu pli ĉe la paĝo:
https://edukado.net/novajhoj?id=897

Atendas vian viziton la redaktoro de edukado.net

Katalin Kovats

## ILEI simpligas ret-aliron por kurs-donantoj

Senlima pagita Zoom-konto de la projekto EToSo (Esperanto-kursaro Tibor Sekelj) de ILEI/IrEA estas libere disponebla por ĉiuj virtualaj kursoj de/per Esperanto. Mi petas vin kaj ĉiujn aliajn interesiĝantojn skribi pri tio al mi kaj/aŭ al Renato Corsetti.

Ahmad Mamduhi, prezidanto de ILEI

## La novjara renkontiĝo atingis la 20-an jariĝon

Pli kaj pli pleniĝas la listo de partoprenontoj en la venonta 20-a Novjara Renkontiĝo. Intertempe jam aliĝis 136 homoj, jen la partoprenlisto:
http://esperanto.land/nr/partoprenantoj_nr20.php

Jen informoj, http://esperanto.land/nr/index.shtml#nr kaj aliĝilo:
http://esperanto.land/nr/alighilo.shtml#alighilo

**Teatraĵo, koncertoj, prelegoj, ekskursoj...**

Kompreneble pli kaj pli alvenas ankaŭ ofertoj por programeroj. Eble vi ŝatos spekti teatraĵon de István kaj Liina Ertl. Eble logas vin koncerto de Ludger Schmeink. Eble plia koncerto. Eble unu el la diversaj prelegoj, ekskursoj - kaj eble, se ne certe, logas vin la personaj renkontiĝoj kun homoj konataj kaj novaj. Mi antaŭĝojas jam nun vidi multajn el vi dum NR jarfine.

Lu (Louis Wunsch-Rolshoven)

## Tra la mondo iras forta VK

La Virtuala Kongreso okazos **ek**de la 23-a ĝis la 26-a de novembro. UEA-membroj por 2024 povas aliĝi senpage al VK. https://vk.esperanto.net/2023 .

Kiel en 2022 estos riĉa programo kun la registritaj programeroj de la UK en Torino kaj tiuj novaj. Interalie vi povos spekti la tutan sciencan programon de Torino, entute 22 prelegojn de IKU kaj de Scienca Kafejo, same kiel en la pasintjara VK estis videbla la scienca programo de Montrealo. La IKU-prelegoj de Montrealo estas videblaj en la jutuba kanalo de UEA, sub la nomo VK22.
https://www.youtube.com/UEAviva .

Amri Wandel

## Ĉina subteno por la UK en Aruŝa

Hodiaŭ samideanoj el la granda ĉina urbo Xi'an kunvenas por esprimi siajn apogojn kaj subtenojn al la UK okazonta en Tanzanio en jaro 2024. Tiu Universala Kongreso estos grava ĉar ĝi estos la unua en la Afrika Kontinento. Afriko pli kaj pli fariĝas la nova pionira regiono por la Esperanto-movado en la 21-a jarcento, la fekunda grundo kie la semo de la lingvo de Ludoviko Zamenhof povos abunde ĝermi kaj produkti multajn bonajn kaj lertajn esperantistojn.
La Esperanto movado en Afriko estas tre aktiva kaj ĝi meritas gastigi tian gravan eventon, speciale post la problemoj kaŭzitaj de la tutmonda pandemio. Homoj ne kongruas kun distanca kontakto, ZOOM-renkontiĝo ne sufiĉas! Oni nepre devas fizike kunveni en difinita loko, kie ni esperantistoj povas vidi unu la alian, ne nur kiel 'bildoj sur ekrano.

## Ĉinio kaj Zaozhuang festos jarfine

https://esperanto.cri.cn/2023/10/30/ARTI95nhBBVjYgDoKgFoZXMe231030.shtml

Artikolo pri la du-monata celebrado por la dekjariĝo de la Esperanto-Muzeo de Zaozhuang-Universitato, de la komenco de oktobro ĝis la komenco de decembro.

Alessandra Madella (AM)

https://uea.facila.org/artikoloj/movado/helpo-al-esperanto-projekto-en-kongo-r396/

https://uea.facila.org/artikoloj/lega%C4%B5oj/kajtoj-ne-nur-gajigas-la-%C4%89ielon-r394/

IKEF kunvenas rete ĉiusemajne

Nia komerca Faka Asocio IKEF kunvenas ĉiudimanĉe per Zoom kaj la azia sistemo Voov. Unuafoje SMG sukcesis partopreni kaj ricevis varman bonvenigon. La ĉefaj partoprenantoj estas aziaj, plej regule el Mongolio kaj Ĉinio. Oni komencis diskuti planojn por Azia agado por 2024. Estas entuziasmo por la okazigo de AMO en Ĉinio en 2024, pri kio SMG prenos kontakton kun Arko, la alelektita estrarano de UEA.

======= vortoj: 1215 ========

**La kolekto de EKO por 2023:** https://www.ilei.info/agado/EKO.php (ĝis 60).

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.:

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.